

# katolika sento

'74

anno 53°
u.e.c.i.

## KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 53° - 1974**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791


Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

# KATOLIKA SENTO - POLA NUMERO

## n° 10

53a Jaro                Oktobro 1974



\+ + +

Ĉi tiu numero de la Roma "KATOLIKA SENTO" estas redaktita preskaŭ entute zorge de polaj esperantistoj, por la ĝojo de la fidela legantaro de nia revuo, sed ankaŭ por altiri la atenton de aliaj, al kiuj ne estis akoraŭ konata la Pola Katolika Unuiĝo Esperantista (Pola KUE), por ke plivastiĝu la familio de la fervoraj verdstelanoj, laŭ la inspiro de "Kavaliro Esperanto", beata Kolbe.

Pro tio, post la memorigo de tiu glora figuro, kiu de la ĉielo invitas ĉiujn al unueco kaj amo pere de la Internacia Lingvo, ĉi tiu numero volas plue prezenti la fondinton de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, P.E. Peltier, kaj ankaŭ la italan franciskanon, P.M. Carolfi, fondinton de UECI, itala sekcio de IKUE.

Fine, ĝi prezentas tradukon de parolado farita de kardinalo Wyszynski, la kuraĝa gvidanto de la Pola Eklezio.

# LA BEATA P.KOLBE KAJ PASTRO E.PELTIER



La Beata P.Maksimiliano Maria Kolbe (nask.7.I.1894), mortigita en la koncentrejo de Oswięcim, kiel numero 16670, la 14an de aŭgusto 1941, apartenas al la plej konataj viktimoj de la lasta mondmilito. Estas la katolika opinio, kiu proklamis lin martiro, en la senco akceptita de la Eklezio. Fakto estas, ke li pereis en la morttendaro kaj liaj murdistoj agis ne nur pro politikaj motivoj. Ili martirigis lin, ĉar li estis sacerdoto kaj li akceptis la morton, kiel libervola viktimo de l'amo al la proksimulo.

Jes, Patro Kolbe estis viktimo de hitlerismo, principe kontraŭkristana, persekutanta en Polujo la katolikan Eklezion, ties instituciojn, kaj la fidelularon. Li akceptis heroe la morton pro la Dia amo. Pruvas ĝin lia tuta antaŭa vivo kaj lia konduto en la malliberejo. Tiu morto al kiu antaŭis virtoplena vivo, atestis pri la plej altaj idealoj de la Kristana religio kaj sekve ĝi estis morto de martiro. Ne nur liaj samlandanoj, sed ankaŭ ekster la limoj de Polujo, oni konsideras lin sankta martiro.

P.Kolbe estis homo de Dio en tuta sia estaĵo. Ami Dion kaj kredi profunde, estis ne nur lia vivosenco, sed ankaŭ motivo de ĉiu ago. Ankaŭ en lia juna vivo aperis religiaj malfacilaĵoj, kiuj ege lin dolorigis. Ili

cedis nur post longdaŭra preĝo kaj firma decido servi en la vivo sole la Dian volon.

La kredo de nia Beatulo baziĝis sur intelekta kaj eklezia aŭtoritatoj. Ĝi estis pliprofundigata per teologiaj studoj kaj adaj meditadoj. Li amis tutanime ĉiun komprenatan veron kaj ĉiam tutkore ĝin praktikis. Lia deziro, ke ĉiuj homoj konu kaj amu Dion, estis granda kaj vekis en li emon savi animojn.

Sekreto de lia neŝanĉelebla persisto kaj neelĉerpebla energio, ĉiam pli grandiĝanta, fariĝis fido al Dio kaj konfido al peranteco de la Sankta Virgulino. Pro tio li sopiris iĝi perfekta instrumento en la manoj de la Senmakula Maria por plenumi en ĉio la Dian volon. Posedante malfortan sanon li ne hezitis, sed fidis al la Dipatrino, ĉiam preta entrepreni novajn iniciatojn, celantajn diskonigi Dion inter la homoj kaj disvastigi inter ili la amon al la sankta Virgulino.

Sian eksteran aktivecon Patro Kolbe apogis sur humila obeo. Nenion li ŝanĝis aŭ komencis, sen konsento de Superuloj. Ili konis liajn planojn, decidojn, proponojn. Ilian volon li konsideris Dia volo. Tio donis al li internan trankvilon kaj forton por labori.

Por siaj proksimuloj li fariĝis servema, spontanea, sincera. Li montris al ĉiu bonkoron, grandanimecon kaj okupiĝis pri ĉies bezonoj spiritaj kaj korpaj. Pri neniu li parolis mise. Kunlaborante, li ne serĉis sian personon.

Li praktikis monaĥan malriĉecon, vere franciskanan. Ankaŭ aliaj ecoj de tiu ordeno lin karakterizis, nome: simpleco, bonhumoro, gajo kaj frateco. Konscia soifo je sankteco estis certe lia ĉefa trajto. La atingendan perfektecon li ĉiam memorigis al siaj kunfratoj. Li kredis, ke por akiri tiun daŭran virtan vivnivelon, plej bonaj rimedoj estas la preĝo kaj la kulto al la Sankta Virgulino.

Liaj filaj pensoj pri Maria kaŭzis, ke li fariĝis moderna Mari-apostolo kaj martiro de l'amo. La gvida ideo pri ŝia Senmakuleco okupas la fundon de lia apostola aktiveco kaj stimulas al totala sindediĉo al la Dipatrino. Ŝi estas por li tiu gracoplena kreaĵo, en kiu Dio sin montras plej videble, kaj en kiu la reago de l'amo estis plej elstara, ĝuste kaŭze de la privilegio de la Senmakula Koncipo, realigita antaŭvide de la meritoj de Kristo. Ŝi estas la majstroverko kaj la supro de la perfekteco inter la kreitaro. Ŝi, tutedieca, elektita modelo en la savekonomio, estas samtempe nia Patrino. En Ŝi loĝas Sankta Spirito kaj Kristo kun siaj Mistikaj Membroj, frukto de Dia kaj Ŝia amo. Pere de Ŝi ni ricevas ĉiujn gracojn kaj pere de Ŝi komenciĝas nia reago je la Dia amo. Ĉiu nia ofero kaj dono por Dio fariĝas, pere de la Senmakula, akceptindaj kaj atingas en Kristo senfinan valoron. Vojo plej sublima por sanktigi kaj plej bone glori Dion, nian Patron, kondukas per Maria kaj Jesuo.

P.Kolbe deziris la dogmon pri la Senmakula Koncipo igi vivanta en la ĉiutaga sindona vivo. Se Maria estas nia idealo, necesas do imiti Ŝin kaj fariĝi kvazaŭ alia Ŝi mem. Fianĉino de Sankta Spirito, Perantino de gracoj, devas en ni vidi animojn mariecajn. Ni kiel Ŝi, devas ankaŭ doni Jesuon al la mondo. Pere de ni, Ŝi daŭre konvertu, sanktigu, kaj konkeru la homaron, ĉiun kunhomaron, por ke oni amu Dion laŭ Ŝia Senmakula Koro. Kondiĉo, por atingi tiun celon, estas totala sindono al Ŝi, decido, fariĝi Ŝia filo, instrumento, alia Kristo, por la savo de l'mondo.

Tiu sindono devas esti senrezerva. Ni dediĉas al Ŝi animon, korpon, ĉiujn fortojn kaj aktivecon, bonojn materiajn kaj meritojn, nian tempon kaj eternecon. Ĉion nur por Ŝia bonplaĉo kaj dispono. Precipe pleje valoras la ofero de nia propra volo. Kiel propraĵoj de la

Senmakula, ni apartenas kun Ŝi al Dio kaj fariĝas Ŝiaj servantoj por disvastigi la regnon de la plej Sankta Koro de Jesuo.

Laŭ Patro Kolbe, tiu totala sindono kondukas al apostolado, al konkerado de niaj proksimuloj, al nia idealo. Dum tiu apostolado Ŝi donas necesajn gracojn. Nia tasko estas nur plenumi Ŝian volon, kiu montriĝas en spertataj inspiroj, en vivbezonoj kaj precipe en la gestoj de niaj superuloj. Ju pli ni obeas, des pli ni realigas la planojn de la Senmakula Patrino. Animo, kiu sin dediĉis al Ŝi, faras tutkonscie sian eblon kaj pretas uzi ĉiujn rimedojn, kiuj troviĝas sub la mano. En tiu preteco, ĉion eluzi, oni baziĝas nur malriĉeco, kiu estas vera fonduso de la Dia Providenco.
Oni sukcesas, kiam oni scias kontaktigi animojn al la Senmakula Virgulino. Sekve en ĉiu apostolado, plej riĉa rimedo estas la preĝo kaj pentofaro, kiuj havigas al ni la Diajn gracojn.

Tiu idealo de la Beata P.Kolbe estas atingenda en spirito de sinofero kaj heroeco. Li antaŭdiras tempon, kiam la Dia amo flamos per Maria en la tuta mondo, kies homoj deziregos diiĝon per Ŝi kaj en Ŝi. P.Kolbe parolas pri "ĉielpreno" de animoj per la amo. Kelkaj rimarkas, ke la eldiroj de P.Kolbe indikas, ke li estis sub influo de Dun Scot:"prioritato de l'amo", de Scheeben: "unueco kun la S.Spirito", kaj de Louis Montfort: "senlima domo".

Ĉio, kion ni supre klarigas, enkondukas nin en lian religian aktivecon, kiu konscie strebas por ŝanĝi individuojn, homgrupojn, la tutan socion. Tiu aktiveco, estante religia, havis socian formon. Li nomis ĝin Kavalirismo de la Senmakula Koncipo. Esence, ĝi estas socia organizo ideologia, do: ne ekonomia, orientigita al la Plej Sankta Virgulino, do: ne politika. Ĝi prezentis sistemon de diversaj agoj, kunordigitaj, ligantan

homojn kun iliaj rimedoj kaj ideoj, celantan konverti kaj sanktigi ĉiujn kaj unuopajn membrojn. Papo Pio XI levis lian t.n. Milicion de la Senmakula Maria, fonditan en 1917 el "Pia Unuiĝo", - al la rango de Asocio "primara". Dank' al tiu privilegio, tiu Asocio povas unuigi ĉiujn anojn de la movado en ĉiuj mondpartoj.

La ideologiaj principoj pri Kavalireco de la Senmakula, distingantaj ĝin de aliaj asocioj dediĉitaj al Maria, estas klaraj, koncizaj kaj enas en tre konkretaj agoj. Ja ĉiu homo devenas de Dio kaj al Li revenas. En tiu reira procezo bazita sur amo de Kreinto, la homo perfektiĝas kaj diiĝas, kiel diras P. Kolbe. La plej altan gradon de tiu perfekteco havas Maria. Ŝi integriĝis kun Dio ne ontologie, sed efektive. Kiel ligilo inter Dio kaj homo, tiu lasta devas necese profiti Ŝian perantecon, precipe, se li volas certe alveni al Dio. Li ankaŭ kondutu, kiel Ŝi, surtere. Kaj li ne timu, nek hezitu, ĉar Ŝi venkas ĉiun malbonon.

De tiuj fundamentaj principoj Beata P. Kolbe devenigas ideologiajn konkludojn kaj difinas celojn de sia organizaĵo.

Por ĉion renovigi en Dio per Maria, la kavalirismo celas konvertadon de homamasoj, pliprofundigon de kono kaj amo al la Senmakula, speciale inter la inteligentularo. Estas ĝi, kiu luktas kontraŭ la malbono sen interese, sindediĉe, kiu suferas pro la malbono kaj antaŭvidas ties malbonan influon sur la kunvivantoj, kiel ankaŭ ĉiujn konsekvencojn de la malbono en la medio. Al tiuj batalantoj kontraŭ la malbono helpas Maria. Se oni volas kun Ŝi venki, oni devas sin dediĉi al la Senmakula Virgulino. Jen la kondiĉo por esti Kavaliro de Maria! Kaj tiu kavalirismo posedas kvazaŭ tri gradojn.

La membroj de la unua grado ne formas organizon en strikta senco, portas la Miraklan Medalon kaj preĝan

te kontaktas kun la centro. En sia medio ili estas kvazaŭ gardostarantoj de la Senmakula Virgulino.

La duan ŝtupon formas rondoj. Ilian agadon difinas statuto akceptenda laŭ la lokaj kondiĉoj kaj bezonoj. Ĝi agordas kun la spirito de la ĝenerala statuto, nomata Diplomo de la Milicio.

Membroj de la triagrada kavalirismo, pro senrezerva sindediĉo al la Senmakula, atingis altan nivelon de la morala vivo kaj donis pruvojn pri heroeco. Ili havas tiom grandan influon kiel spiritaj gvidantoj, ke aj na formalaĵo estas superflua kaj ĉiu organiza formo povus ilin eĉ ĝenadi.

Sur diversaj kampoj: loka, dioceza, nacia, internacia - la movado ricevas taskojn, difinantajn la rezulton de la agado. Rondoj kaj memstaraj membroj, elektas libere la manieron realigi la rekomenditan taskon. Ili diskonigas la ideologian substancon, la instruon kaj manieron konduti antaŭ la homamasoj. Uzataj estas moralaj rimedoj: ĉefe preĝoj, pentofaro, libervola malriĉeco, obeo. Inter la materioj troviĝas ĉiuj atingoj de la homa genio.

La agado de la kavalirismo havu sian esprimon en Dia amo, amo al la Dipatrino kaj al la homo, konsiderata Diinfano, eĉ kiam oni kontraŭstaras lian malbonfaron. Ĉiu agado estu ligita kun la Eklezia hierarkio kaj kunordigita kun aliaj konfesioj kaj organizaĵoj. Ĝia plano respektu la bezonojn kaj kondiĉojn de la socio .

Dank' al tia iniciato de Patro Kolbe kaj sub lia inspiro, la kavalirismo de la Senmakula Virgulino atingis altan gradon de evoluo en Polujo inter la du lastaj mondmilitoj. En 1939 la kavaliroj nombris pli ol du milionojn, kio en popolo 33-miliona prezentis ne nur organizon, sed religian movadon dediĉitan al la Mari-kul

to plej edifa . La centro troviĝis en la plej grandamonaĥejo kun 600 membroj. El ĝi disiris en la tutan landon: unu ĵurnalo, unu semajna gazeto, kvin monataj revuoj, unu trimonata kaj unu aperanta ĉiujare, kiel kalendaro de la Senmakula Dipatrino. Ankaŭ diversaj propagandaj folioj kaj libroj estis presataj. Inter la revuoj plej konata estis la "Kavaliro de la Sanmakula Maria", kies eldonkvanto en jaro 1934 aperis en sep cent mil ekzempleroj. La Mari-hejmo posedis prop - ran presejon, raditelegrafan stacion kaj aerodromon. Tia aktiveco prosperis kun sia ideologio kaj strukturo, ĉar ĝi respondis al la bezonoj de la tiama pola socio kaj al la ŝanĝoj sinsekvantaj en Eŭropo. La ideologiaj principoj bazitaj sur la privilegio de la Senmakula Koncipo de la Dipatrino ligis la movadon al la fluoj spiritaj en Polujo, kie la Marikulto plifortiĝadis ekde la dogmoproklamo pri la Senmakula Koncipo kaj post la miraklaj aperoj en Lourdes kaj Fatima.

En la organizo forestis hierarkia dependeco. Sufiĉis spirita influo, demokrata centrismo kaj kreaj iniciatoj de la membraro. La membroj povis aparteni al diversaj organizoj, kluboj kaj partopreni diversajn sociajn grupojn. Oni aktivis precipe en industriaj medioj.

Patro Kolbe celis, ke la movado formu sur la unua ŝtupo kiel eble plej grandan homamason, facile kunvivantan kun la socio, akceptantan direktivojn de la Centro, kiu sciis konformiĝi al la vasta publiko per siaj rimedoj kaj eldonaĵoj. La tuta agado iris renkonten al tiuj tendencoj en Eŭropo, kiuj formis la t. n. kulturon de la homamasoj. Ankaŭ persone havis P. Kolbe grandan influon sur la disvolviĝo de la kavalirismo. Liaj sinteno, abnegacio, neprofitemo kaj apostola fervoro regis la centran agadon kaj sciis emigi la adresitojn akcepti proponitan taskon.

+

Pro la morto de la Fondinto finiĝis la unua etapo de la kavalirismo.

Doninte sian vivon, por savi alian, li fariĝis modelo kvazaŭ de la dua etapo, en kiu diversaj entreprenoj devas esti realigataj per novaj individuoj, posedantaj forton konvinki kaj prudenton konvinki en ĝusta tempo. Ili devas vidi en sia loko Patron Kolbe, kiu, se li vivus, efike servus la Mistikan Korpon de Kristo, nome, ĉiujn Di-infanojn bezonantajn sian Dipatrinon. Ili disvastigus daŭre la amon, kiu familiigas la homojn, la amon al la Patrino de la Bela Amo.

La movado povis en Polujo gajni milionojn kaj elokventi por la homamasoj, ĉar ĉiuj estis unuigitaj per la sama lingvo. Patro Kolbe pensis tamen ankaŭ pri aliaj nacioj. Li sopiris gajni la tutan mondon al la Senmakula Dipatrino. Lia "Kavaliro" kun pli ol miliona eldonkvanto en Polujo, devis komenci sian apostoladon en aliaj lingvoj. Eĉ kiel multlingvulo, nia Beata Martiro sentis la malhelpon, kiun kaŭzas la diverslingveco. Por atingi alilingvanojn li aperigas en latina lingvo sian "Miles immaculatae". Sed kiel atingi la popolojn kaj homamasojn de aliaj kontinentoj? Estas neeble starigi en ĉiuj landoj centrojn similajn al tiu en Polujo.

Li vojaĝas al Japanujo. Ĝuste en 1931 havas lokon la tutjapana esperanto-kongreso en Tokio. La tieaj radio kaj la gazetaro raportis pri ĝi, kaj P. Kolbe legas pri la granda sukceso de la Zamenhofa lingvo kaj ties alta intereso ĉe la inteligentularo. Tiam li rememoras, ke la lulilo de tiu lingvo estas lia Patrujo, for de kiu li nun laboras. El sub lia plumo iras letero al lia Kunfrato Patro Nazim', en kiu videblas jena frazo: "Kavaliro Esperanto havus certan sukceson eĉ ĉi tie en Japanujo". Ni povas supozi, ke ekde tiu jaro maturiĝas lia konvinko, ke la Zamenhofa Mondlingvo solvus multajn proble-

mojn en la tutgloba Dia familio. Per Esperanto, la arango de diverslandaj centroj kun unu internacia gazeto, oficiala organo de la kavalirismo, realigus multajn liajn planojn. La diversaj agadoj, enketoj, posedus internacian reeĥon. Ne renkontus lingvajn barojn: internaciaj kongresoj, simpozioj, spiritaj ekzercoj. La kontaktoj de mondaj ligoj kaj institucioj antaŭenigus per Esperanto la socian karitatagadon kaj misilaborojn. Internaciaj nekatolikaj centroj, konfesioj kaj diversaj socio organoj konus la kristanajn sintenon, konvinkon, celadon. Jenaj perspektivoj aperis antaŭ liaj okuloj, kiam li aŭdis, ke ekzistas Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Kiam pola IKUE-ano, studento en porpastra seminario, petos la redakcion de Rycerz Niepokalanej" pri detaloj koncernantaj la Esperantan Kongreson en Varsovio (1937), Patro Kolbe en sia respondo skribis jenan frazon: "... la partopreno en la tutmonda esperanta movado plaĉas al la Senmakula Patrino". Tiuj vortoj troviĝas hodiaŭ sur la memortabulo ĉe lia altaro en Niepokalanów, la Mari-hejmo de la kavalirismo (v.K.S.n° 7-8, paĝ. 151). En 1935 aperis en latina lingvo la "Miles Immaculatae" (Kavaliro, militanto, de la Senmakula). Parolante en 1937 pozitive pri esperanto, la latino de novaj tempoj, P. Kolbe povis jam certe fari komparojn inter tiuj du lingvoj. Estas mirinde, ke ankaŭ en la letero al Patro Nazim, li ne skribas pri "Kavaliro de Senmakula en esperanto", sed tutsimple pri: "Kavaliro Esperanto", kvazaŭ la vorto esperanto: "havanta esperon", entenus jam ĉion, kion la homoj tutmonde atendas de Dio kaj inter si mem. Espero esprimas kaj sopiras amon, kondukantan al la Patrino de la Bela Amo. Tial ni ne miras, kial ne nur polaj esperantistoj pilgrimas al la Mari-hejmo de P. Kolbe, kial havas tie lokon esperantaj diservoj, esperanto-simpozioj, kaj kial en E





sperantujo disvastiĝas la idealoj de P. Kolbe. Ankaŭ la Fondinto de la revuo "Espero Katolika", Pastro Emilo Peltier, dediĉis sin kaj la tutan esperantistaron al la Senmakula Koncipo en Lourdes, kie Ŝi vokis lin al la Eklezio Triumfanta.

PASTRO EMILE PELTIER, (1) naskita la 20-an IX. 1870 en Villendray, apud Tours en Francujo, ekde junaĝo interesiĝis pri lingvoj, precipe pri la latina, kiun li deziris kompreni antaŭ ol ĝin studi, nome: dum la Sankta Meso, kiun li preskaŭ ĉiutage partoprenis. Poste antaŭ la sacerdotiĝo, 27.V.1893, li ĝin jam majstros. Li konos krome la anglan, germanan, kaj sufiĉe bone la italan, hispanan kaj portugalan. Lia deziro tamen iris al aliaj lingvoj, kiuj ne najbaris kun lia gepatra franca idiomo. Estante profesoro en t.n. Malgranda Seminario kaj la kolegio S.to Georgo en Tours, li lernas la Zamenhofan Mondlingvon. En 1902 li ricevos leteron de esperantisto S.ro Henri Auroux, kiu sugestas al li fondon de societo por disvastigo de Esperanto inter la katolikoj. La Ĉefepiskopo de Tours, René François, skribis al P. Peltier: "Mi tre volonte aprobas tiun projekton, kiu ŝainas al mi favori la disvastigon de l'evangelio kaj la pliunuiĝon de popoloj".

En 1903 ekfunkciis societo, kiu en oktobro eldonis "Espero Katolika", revuon, kiu, propagandante esperanton, deziris edifi per ĝi la sam- kaj ali-kredanojn. P. E. Peltier invitis alireligiajn samideanojn skribi en E.K., certa, ke la "interna ideo" de esperantismo konscias pri la vortoj: ĝentileco, frateco, toleremo kaj humanismo. Sufiĉas, ke oni penas laŭvere vivi, laŭvive

---

(1) v. foton je paĝo 228.

pensi kaj laŭpense, klare, verki.

Kiam en 1905 estis kunvokita en Boulogne sur Mer la unua internacia Esperanto Kongreso, Pastro Peltier trovis tie samcelanojn el 22 diversaj landoj kaj alparolante la ĉeestantaron diris: "Karaj Gefratoj, la koroj de ĉiuj ĉi tie estas plena je frataj sentoj. Sed ĝis nun oni parolis nur pri la frateco inter diversnacianoj. Mi esprimas la deziron, ke Esperanto ankaŭ fratigu la diversreligianojn: ke ĉiuj pastroj katolikaj, protestantaj, hebreaj kaj rusortodoksaj unuiĝu per esperanto por kune labori al la universala frateco. Mi povas certigi, ke "Espero Katolika" ĉiam klopodos atingi tiun celon". Dum tiu U. Kongreso, katolikoj havis apartan kunvenon, dum kiu P. E.Peltier diris: "Ni devas esti plej fervoraj pioniroj de la universala frateco, ĉar ĝi estas sub alia nomo: la amo al ĉiuj homoj, fratoj per Jesuo Kristo". Pastro Peltier volis esprimi la penson, ke homoj, eĉ kun unu mondlingvo, ne povas paroli pri frateco kaj homara familio, se ili ne posedos sian Dipatrinon kaj ne agnoskos la Patron, kiu estas en la ĉielo.

Ankaŭ P. E.Peltier revis pri granda revuo, centpaĝa, havanta korespondantojn en multaj landoj. Oni parolus en ĝi pri la religia movado en la tuta mondo, pri interkonsentoj inter diversaj konfesioj; oni legus artikolojn teologiajn, filozofiajn; estus novaĵoj el aliaj kampoj, gravaj por la estonto de l'homaro.

Krom tiu granda revo P. E.Peltier deziris fondi unuiĝon por diversaj konfesioj. En 1906 li publikigis leteron al ĉiuj kristanaj pastroj: "Karaj Fratoj en Kristo, En la neforgesebla kongreso de Boulogne, mi deziris en tosto la unuiĝon de diversreligianoj per esperanto. La deziroj estus vanaj, se ili ne eksteriĝus en realecon per agoj. Hodiaŭ mi proponas al vi ekrealigon de tiu entuziasme akceptita kaj aplaŭdita deziro". Laŭ P. Peltier, kiam la unuiĝemaj pastroj sin konos recipro-

ke, tiam sekvos certe aliaj paŝoj...

La Redaktoro de "Espero Katolika" vidis pli malfrue la celon atingeblan post longa tempo. Tiu "longa tempo" daŭris ĝis la 2a Vatikana Koncilio, kiun krom la katolikaj episkopoj partoprenis, kiel observantoj, anglikanaj kaj rusortodoksaj teologoj kaj patriarkoj. La kunvokitaj Patroj konstatis ankaŭ la lingvajn malfacilaĵojn. Oni enkondukis la naciajn lingvojn en la liturgion, kiu lige kun la naciaj akceptis ankaŭ nian mondlingvon, la latinon de la estonto.

En la sama jaro, kiam P. Peltier publikigis sian ekumenan leteron, Sankta Pio 10a sendas sian apostolan benon al la E.K.-redaktoro, esprimante sian plaĉon por la katolika esperanto-movado, kies animo restas daŭre P. Peltier. Fortega je koro kaj spirito, sed malforta pro la farto, li skribas en marto 1907: "Mi preĝis, por ricevi lumon de Dio. Mi demandis min multfoje: ĉu mi haltu sur la vojo aŭ ĉu mi iru antaŭen?"... Kaj li aldonas: Mi disĵetos mian reton kaj ĝoje kaj senlace kaj prospere"... Jes, P. Peltier, kiel Patro Kolbe, estis kaptisto de animoj. Li volis tion fari pli efike per la t.n. "Frataro de katolikaj esperantistaj pastroj" (hodiaŭ Rondo S. Pio 10a). "Ni devas serĉi - li skribis - kiamaniere Esperanto povas utili sur la kampo de agado". Tamen denove lia farto malboniĝas. Li reiros al Lourdes peti la Dipatrinon aŭ resanigi lin, aŭ doni al li la gracon morti en ŝia sanktejo. Tiu lasta graco estis donita al P. Peltier. Li mortos en Lourdes la 16an de februaro 1909.

Mortis tiu sacerdoto, kiu kiel unua komprenis la utilecon de l'esperanto por la Katolika Eklezio, unu Ŝafejo de unika Paŝtisto, al kiu li volis konduki ĉiujn kristanojn kaj Di-infanojn.

Post la morto en Lourdes, la nova EK-redaktoro skribis: "El tia vivo ni devas tiri konkludojn. Lia ver-

ko devas postvivi. El la ĉielo, kie, ni ne dubas, lia bela animo purigita en longa suferado ripozas apud Dio, li preĝos por ni".

Kaj ni ĉiuj, kiuj legas pri la du modernaj apostoloj, filoj de la Ĉiela Dipatrino, sendube vidas similecon inter la du sindediĉaj animoj. Ambaŭ konfidis siajn promesplenajn verkojn al la Senmakula kaj ni ne hezitas esprimi la konvinkon, ke Pastro Peltier certe proponus al la kavalirismo la mondlingvon, pri kiu tiom trafe skribas Patro Kolbe, kiel ankaŭ nia Beatulo ĝojus vidi en la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista la idealojn, kiuj konkeras kun Maria, al kiu la Redaktoro de "Espero Katolika" dediĉis nian movadon.

P. Paruzel

APUD LA MEMORIGO de ĉi tiuj du elstaraj figuroj tiel malsamaj, sed kontaktiĝantaj pri multaj vidpunktoj: admiro pri Esperanto, tuteca sinofero, amo al Maria ...ŝajnas al mi, ke ne devis manki tiu de p. Carolfi (1) la itala esperantista franciskano, modesta, kiel lia nomo tekstis, kaj tamen monumenta en la katolika movado. Lia vivo, fakte, estis tiel intense dediĉita al disvastigo de Esperanto en la katolika kampo, ke ŝajnas preskaŭ nekredeble, ke nur unu persono povis tiom plenumi.

Temis pri la sennombraj prelegoj faritaj en la plej malsamaj medioj, popularaj, religiaj, altnivelaj. Pro tio li estis senĉese vojaĝanta de unu al alia urbo, de unu al alia ŝtato. Temis pri kursoj pri Esperanto, pri ol mil! temis pri pluraj verkoj, plejofte religiaj, kiel "Preĝareto", la "Esperanta Katolika Preĝlibro", "La Virgulino de la malriĉuloj", biografioj pri S. Francisko de Asizo kaj pri S. Antono de Padovo, ktp., sed an

v. foton je paĝ. 229.

kaŭ kun celo de turismo kiel la "Ilustrita gvidlibro pri Rimini". Kelkajn esperantistajn grupojn li fondis, alijn li direktis. Dum la plej malfacila tempo de la esperantista movado, t.e, tuj post la unua mondmilito, li eĉ kuraĝe transprenis la prezidantecon de la Itala Esperanto Federacio. Temis pri aranĝo de internaciaj kongresoj de la katolikaj esperantistoj, kiel prezidanto aŭ vicprezidanto. La plej grava el ĉi tiuj estis tiu de la Sankta Jaro 1950 en Romo; kaj nia penso iras al li, dum ni pretigas nin por la sama agado en la nuna Sankta Jaro. Temis pri fondo kaj zorgado de lia plej kara iniciato: la Itala Unuiĝo de la Katolikaj Esperantistoj, UECI, al kiu li donis, kun la Statuto, ĉiujn zorgojn de sia granda koro kaj de sia intelekto. Tion, kion faris Peltier, pri IKUE, realigis p. Carolfi pri la nacia UECI, kies organo estas nia jam 53-jara "Katolika Sento".

Kaj tamen li ne havis fortan sanon; plurfoje li estis malsana kaj ricevis kirurgiajn intervenojn. Kiam Dio alvokis lian animon je la 1a de julio 1958, li de ne longe celebris 50 jarojn de sacerdota vivo kaj 46 de laboro pri Esperanto, ilo de la religio. P. Carolfi estas elstara figuro, kiu en la tuta Eklezio kaj aparte en la Ordeno de li tiom amata, povas prave esti montrata kun ĝusta fiereco, kiel modelo al ĉiuj.

## PREĜO DE P.M.KOLBE

Degnu, ke mi Vin gloru,
Plej Sankta Virgulino.
Permesu, ke mi Vin laùdu
per ĉio, kion mi disponas.
Degnu, ke mi por Vi kaj nur pro Vi
vivu, laboru kaj suferu,
pro Vi mi eluziĝu kaj mortu.

Permesu, ke mi kontribuu
por Via plej granda kaj centobligita elstarigo.
Permesu, ke mi kaŭzu al Vi tian honoron,
kiun neniu antaŭe al Vi preparis.
Permesu, ke aliaj tamen,
fervore Vin altigante, min superu,
kaj ke mi poste, kvazaŭ en nobla vetkuro,
ĉiam pli profunde kaj rapide vian gloron disvastigu,
ĉiam pli potence,
tiel, kiom atendas Tiu,
Kiu Vin neeldireble
super ĉiujn aliajn estaĵojn altigis.

## LA POSTKONCILIA EKLEZIO (1)

Silento regas en la orienteŭropa Eklezio. Heroaj kardinaloj mortis aŭ estis mutigitaj. Sub premo de false komprenata politiko pri malstreĉiĝo, episkopoj serĉas interkomprenon kun malamikoj de Dio. Kelkaj episkopaj sidejoj estas okupataj de t.n. pacpastroj, plenumantaj senvole la ateistajn detruplanojn. Je ordono de komunistaj registaroj: piaj kaj fervoraj sacerdotoj estas suspendataj kaj eĉ forigataj de siaj Ĉefoj el siaj parohoj. La Sanktejon eniris "abomeno de la detruo"..
Ne mankas tamen kuraĝo al Kardinalo Wyszynski, kiu ĉijare, antaŭ mult-

---

(1) Sendis la artikolon KS-legantino, do aŭskultintino de la viva parolado.

nombra studentaro kontraŭdiris al persekutantoj de la Eklezio. Neglektinte diplomatajn frazojn, Li montris per klaraj vortoj la Diajn malamikojn, kiuj en - kaj ekster - la Eklezio plenumas sian detruagadon. Li priskribas la falsan kaj veran postkoncilian Eklezion kaj donas signon al kontraŭofensivo kaj memdefendo. Ni citas en nia K.S. kelkajn pensojn de Lia prediko:

Ni havas impreson, kvazaŭ la vivo de la postkoncilia Eklezio forgesus pri la okazintaĵo de la Kalvari-monto. Ŝajnas ofte al ni, ke la hodiaŭa Eklezio kaŝas siajn postulojn kaj ne solvas jam la problemojn laŭ la volo de la vivanta Dio, sed laŭ la homaj ebloj. La Eklezio ŝajnas ne atenti la erarojn de siaj gefiloj, servantoj: pastroj, episkopoj, monaĥoj. Elastiĝis la kredo kaj la kristana etiko iĝis relativa. En la gazetaro aperas opinioj de diversaj teologoj, kiuj senrezulte serĉas la veron pri la eklezio kaj donas en siaj studoj ekzemplon pri sia malkapablo. Laŭ tiuj aŭtoroj, la Eklezio estas nebula: sen la ŝtonaj tabuloj de la dekalogo, fermanta okulojn antaŭ la peko, timanta riproĉojn esti tro tradicia, malprogresa kaj malmoderna. La Eklezio de tiuj sin-kontraŭdiraj teologoj forgesas pri la Krista instruo, kiu baziĝas sur: ne, ne; kaj jes, jes.

Malgraŭ tiu arta nebulo, plena de malespero kaj malcerteco, ĉiu kredanto povas rekoni la vizaĝon de la postkoncilia Eklezio. Ĝi havas heroojn inter siaj kardinaloj, kiuj fariĝis ties Konfesantoj, Martiroj kaj Malliberuloj. Jen ekzemploj:

En Ĉeĥoslovakio mortis ĉijare Kardinalo Trochta. Preskaŭ sian tutan episkopan vivon li pasigis en malliberejoj. Oni forigis Lin de lia diocezo kaj kondam -

nis al deviga fabriklaboro. Liaj kunlaboristoj sciis, ke li ne venis, kiel pastro-laboristo por konkurenci en la lukto gajni la panon, sed venis, kiel punito al la fabriko. Lia unika kulpo konsistis en tio, ke li estas episkopo de la Krista Eklezio.

Ankaŭ Kard. Stepinac estis malliberulo kaj forigita de sia posteno. Oni entombigis lin en la Zagreb-katedralo. Floroj kaj kandeloj surtombe rememorigas pri la reviviĝo kaj eterneco. Oni forigis lin de la episkopa sidejo, ĉar Li estis episkopo, kiu konfesis Kriston.

Malproksime de sia episkopa sidejo mortis la ĉefepiskopo en Praha, kard. Beran, malliberulo de Dachau-koncentrejo kaj malliberulo de la nuntempo. Lia unika kulpo konsistis en tio, ke Li konfesis Kriston. Li mortis famigita pro sia sankta vivo.

Kardinalo Mindszenty, Primaso de Hungarujo, estis malliberulo kaj de sia episkopejo forigita. Kial? Ĉu Li estis malamiko de sia popolo kaj patrujo? Ne! Li estis episkopo, kiu konfesas Kriston.

Kaj Kardinalo Slipyj, ĉefepiskopo de Lvov, estis pli ol 20 jarojn en ekzilo kaj malliberigita. Li vivas nun ekster sia patrujo. Kial? Ĉiam denove kial? Je tiu demando liaj malamikoj ne kuraĝas doni sinceran respondon.

Jen edifaj ekzemploj de la vera postkoncilia Eklezio en orienta Eŭropo. Dio mem vidigas al ni, kiel devas aspekti Lia Eklezio, sendinte siajn kardinalojn, ke ili batalu surfronte por konfesi Kriston kaj fariĝi Liaj malliberuloj kaj Liaj martiroj.

Studentoj kaj Studentinoj, ne formu al vi iluziojn, ke viaj personaj kaj akademiaj legitimiloj montras, kiuj vi estas. Kiuj vi estas kaj de kiu vi devenas povas vin respondi nur la Dia Spirito aganta en vi, vekanta vian konsciencon, viviganta vian kuraĝon.

Venis tempo, ke vi sentime respondu; ĉar homo falas en mem-malestimon, se li ne estimas sin mem, se li sian homan dignon kaj siajn rajtojn ne defendas.

Venis tempo, ke vi levu vian voĉon en la intelekta, morala kaj socia malordo, dirante al viaj gekolegoj: Atentu vian dignon, ĉar vi devenas de via ĉiela Patro!

Jam estas tempo, ke vi inter vi ĉiuj decidu: Kolegaro, estimu niajn koleginojn, ĉar ili estas la ontaj patrinoj de la nova Pollando kaj ni volas, ke Polujo renaskiĝu el ĉastaj patrinoj, kiuj sin mem honoras kaj pro sia konduto konkeras la estimon de la socio!

Venis tempo, ke vi diru al viaj edukantoj kaj profesoroj: Instruu al ni la veron kaj ne ruinigu nin! Ne forprenu de ni la kredon. Ne detruu nian Kristan kaj moralan vivostilon per ajna vana laikismo, kies sencon neniu komprenas kaj por kies disvastigo oni elspezas tiom da mono. Ne forprenu de ni la kredon pri la vivanta Dio, ĉar ni fariĝus sklavoj de idoloj, kiel iam la antikva Izraelo, kiel Judaso, kiun kovris mallumo, post kiam li forlasis la Sanktan Tablon por perfidi la Sinjoron.

Venis tempo, ke vi, ĉie kie ajn vi troviĝas, en lernejoj, studentaj hejmoj, ludejoj, havu la kuraĝon postuli: Estimu nin, estimu reciproke, ni estas homoj! Ne forŝiru el ni la kredon, ĉar vi povas nenion pli valoran al ni proponi.

Venis tempo, ke vi eĉ al viaj gepatroj devas diri: Se vi ne povas nin eduki kristane, ĉar vi ĝin eble ne scias, aŭ ne havas tempon, tiam ne malfortigu almenaŭ per viaj "kalkuloj" nian kuraĝon por konfesi nian kredon. Ne malkuraĝigu nin, ke ni ne forvendu nian dignon, kiun Dio al ni donis, pro telero da lentoj.

La plej granda peko ne estas la ne-kredo, kiun ni konsideras persona malfeliĉo kaj homa malscio, sed la

organizado de ateismo, aranĝado de ateismaj programoj, subtenado de ateismaj sistemoj per sociaj kaj publikaj rimedoj.

Oni konfidis tiujn rimedojn al la Ŝtato ne por ke ĝi detruu la kredon je Dio, sed por ke oni prizorgu la publikan ordon; ne por fari kaoson, sed por konstrui.

Venis tempo, ke vi al ni animzorgantoj kaj episkopoj kuraĝe povas diri: Ne plaĉas al ni via emo faciligi la vivon. Ni ne ŝatas tion, ke vi estas malkuraĝaj por starigi al ni postulojn. Se vi vidas niajn erarojn, montru ilin al ni, ĉar tio estas via tasko. Ni ne deziras malkuraĝajn animzorgantojn, kiuj ne apelacias al nia sindediĉo kaj servopreteco.

Venis tempo, ke vi eĉ devas diri al tiuj la veron, kiuj sub preteksto de socia aktiveco fortiras vin de la preĝeja diservo dum dimanĉoj kaj festotagoj. Ili donas en viajn manojn hakilojn kaj ordonas al vi fosi sulkojn kaj meti kablojn. Tio ne estas laboro por la junularo, laboro, kiu valorus en ekonomio. Oni forprenas de vi sole la necesan tempon por la sano, la t.n. spirpaŭzon, la komunan vivon en la familia rondo, por la refreŝigo de viaj fortoj post streĉa laborsemajno, oni malhelpas al vi la kontaktojn kun la preĝejo, kun la eŭkaristio. Pri kio temas en tiuj devigaj laboroj? Eble oni pensas anstataŭigi la laborfortojn de tiom da homoj, kiuj devas serĉi en eksterlando ajnan laboron, ne trovante laboron en sia patrujo. Aŭ oni volas simple reteni la junularon de la dimanĉa ripozo, de la Diservo kaj de homdigna vivo.

.................................................................

Sinjoro de l'Universo, gardu nian kardinalon Wyszynski! Deturnu de Li ĉiujn danĝerojn, gardu lin por la brava Pollando kaj por la tuta Eklezio. Donacu al Li la plenon de Via graco, por ke li daŭre antaŭeniru en niaj misaj tagoj antaŭ ni, kun forto kaj saĝo sur la mallarĝa kaj dekliva vojo al la eterna vivo. Amen.

.................................................................

SANDOMIERZ. - Okaze de la 300a datreveno de la ekzisto de la Filipanaj Fratoj en la pola diocezo de Sandomierz, estis celebritaj solenoj kun la ĉeesto de la pola Primaso, kard. Stefano Wyszynski, de 9 episkopoj, pli'ol 200 sacerdotoj kaj 10.000 fideluloj. Dum le ceremonioj, antaŭpretigitaj per preĝsemajno, la helpepiskopo de la urbo, mons. Wojcik, legis la brevon de Paŭlo 6a, kiu promocias la preĝejon el sanktejo al titolo de malsupera Baziliko. En ĉiuj preĝejoj de la diocezo, post la vesperaj sanktaj ritoj, disvolviĝis eŭkaristiaj procesioj kunpreĝantaj por la apostolado de la Filipanaj fratoj.

POZNAN. - La eks-enkarcerigitoj en la koncentrejo de Dachau pilgrimis al la katedralo de Poznan, por memorigi la 29an datrevenon de sia liberigo. En sia homilio mons. Antono Baraniak substrekis la kristanan signifon, kiun esprimis por la pola kaj por la universala Eklezio la suferoj de la kaptitoj en la koncentrejoj. Fine de la celebro, la partoprenantoj recitis la preĝojn por la jubilea indulgenco.

PLI OL 1.000 ŝoforoj de kamionoj kunvenis en la sanktejo de Swieta Gora, ĉe Costyn, diocezo de Poznan, okaze de sia tradicia porpreĝa tago. Dum la kunveno, ĉijare kunligita kun la jubilea pilgrimado, estis celebrata solena diservo por la ĉeestantoj kaj por tiuj, kiuj mortis en la plenumo de sia laboro. La ceremonioj finiĝis per la beno de la aŭtomobiloj.

Oni ĵus celebris en Ĉenstokovo la 75an datrevenon de starigo en la urbo, de la Kongregacio "Fratinoj de la "Reviviĝinto". Direktis solenan kuncelebradon en la domo de la religiulinoj, la loka episkopo, mons. Barela, je ĉeesto de multnombra fidelularo kaj de multaj reprezentantoj de la dioceza klerikaro.

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

| | |
|---|---|
| *Quota di abbonamento L.* | **1500** |
| *Abonkotizo italliroj* | **1500** |

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE